TEJO-aktuale: numero 380, 2014-05

### Kreu la emblemon por IJK 2015!

La temo de la 71-a IJK estas elektita: Tutmonda Justeco. Kadre de tiu ĉi grava temo ni invitas ĉiujn krei belan emblemon por tiu ĉi IJK. Vi povas sendi via(j)n bildo(j)n al ijk ĉe esperanto.de ĝis la 15-a de majo, kaj poste la organiza teamo komune elektos la plej taŭgan emblemon. La desegninto de la elektita emblemo ricevos rabaton por partopreno en la 71-a IJK.
Preci zajn regulojn vi trovas ĉe http://esperanto.de/reguloj_emblem_konkurso_ijk.

### Kontribuu al TEJO-Strategio 2014-2017

Antaŭ unu jaro okazis vastskala konsultado de la proponoj por la Laborplano de TEJO por la jaro 2013/2014. La rezulton vi trovas ĉi-tie: http://bit.ly/laborplano2013. Ĉi-foje ni ŝatus fari plian paŝon en la sfero de strategia planado kaj invitas vin kontribui al ĝi. Eblas tion fari kelkmaniere, depende de via emo kaj tempohavo. Detalojn pri tio vi trovos en tiu ĉi blogero. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1561

### Taskolisto pri farendaĵoj por kaj per TEJO

Dum la malsamideana debato okazinta dum la lasta Junulara E-Semajno "Kion faras kaj faru TEJO?" ekestiĝis la ideo de krei liston de taskoj de la laborplano, por ke laboremuloj povu vidi la taskojn farendajn, farindajn.

Du aktivuloj, Cédric Marchall kaj Rakoen Maertens faris la bazon de la listo videbla ĉe "Taskoj el la laborplano".

Espereble iam baldaŭ ĝi estos en pli uzebla formato, sed ankaŭ ĝis tiam vi bonvenas uzi ĝin, kaj disvastigi ĝin, por helpi ke agemuloj kaj taskoj trovu unu la alian, kaj tiel la agado de TEJO pli rapide kaj efike disvolviĝu.

Indas ĝin regule rigardi, ĉar antaŭvideblas ke ĝi ŝanĝiĝos :) Komentoj, konsiloj, ideoj pri la tabelo bonvenas ĉe: hr ĉe tejo.org. Legi pli: http://tejo.org/eo/node/1560

### DEKA JUBILEA KONGRESO DE EEU - RIJEKA (Kroatio) - JUSTA LINGVA SOLVO EN EU – 6a ĝis 12a julio 2014

La deka jubilea kongreso de EEU diskutos pri la temo „Justa Eŭropo – justa lingva solvo en EU“ kion aparte substrekis en sia deklaro kroata ŝtatprezidanto Ivo Josipović, kiu aŭspicias la kongreson pro tio ke lia prezidanta programo ĉefe enhavis la celon realigi pli justan Kroation. Li diris ankaŭ ke li mem subtenas Esperanton ĉar ĝiaj celoj: paco kaj amikeco kongruas kun liaj politikaj kaj personaj celoj. Li invitis delegitaron de EEU al aparta akcepto kiun li faros en junio ĉi-jare.

Aliĝu do al escepte interesa kongreso, kontribuu al vasta diskuto pri la ĉeftemo pri kiu prelegos ankaŭ neesperantistaj fakuloj kaj superaj politikistoj.

Ne nur ke vi havos la okazon serioze partopreni en grava esperantista kunveno, kies rezultojn sekvos la ĝenerala ĵurnalistaro en Kroatio, sed ankaŭ vi povos ĝui en abunda kultura programo: ĉiutage vespere okazos koncerto aŭ teatra spektaklo kaj dumtage estos pluraj ebloj viziti kulturhistoriaĵojn en Rijeka inkluzive de la nova moderne konstruita moskeo en Rijeka.

Venu do al bela mediteranea regiono, Adriatika marbordo kaj spertu belegan naturon en facile atingebla parto de Eŭropo. La tuttaga ekskurso gvidas vin al ĉarmega ĉirkaŭaĵo de Rijeka kaj vi povas aliĝi ankaŭ al 4-taga antaŭkongreso kies programon vidu ĉi tie: http://eeu-kongreso.webnode.com/anta%C5%AD-kaj-postkongresoj/

Informoj pri la kongreso: http://eeu-kongreso.webnode.com/

### Bonan Apetiton, nova projekto de E@I

Ĵus malfermiĝis Bonan Apetiton, nova projekto de E@I. Temas pri retejo por vegetaraj kaj veganaj receptoj en Esperanto. Pliriĉigu la enhavon aldonante viajn ŝatatajn receptojn kaj provu tiujn de aliaj uzantoj! Rigardu: http://apetito.ikso.net/

### [Somera Esperanto-Studado 2014 - Rusio] Ĉi-jare okazos SES 2-foje!

*Malsukcesa elŝuto.*

### SoRen 2, Tam Đảo, Vĩnh Phúc, Vietnamio, 5a kaj 6a de julio 2014

SoRen estas Somera Renkontiĝo okazigata ĉiujare de Vjetnama Esperantista Junulara Organizo. Ni bonvenigas ne nur Vjetnamajn Esperantistojn sed ankaŭ ĉiujn esperantistajn amikojn tutmonde. ĉi jare SoRen okazos en Tam Dao (tri insuloj - insuloj sur montaro) en norda Vjetnamio dum 2 tagoj de la 5an ĝis la 6an de Julio. Ni ĝojas je via partopreno kun ni. Legu pli: https://www.facebook.com/events/449892891777696

### TRIA TUTMONDA EKZAMENTAGO LA 17-AN DE MAJO

Post la grandaj sukcesoj de la Unua kaj Dua Tutmondaj Ekzamentagoj la komisiono de UEA pri la Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) decidis aranĝi similan tagon ankaŭ ĉi-jare. La dato de la 3-a Tutmonda Ekzamentago estas la 17-a de majo 2014.

La 3-a Tutmonda Ekzamentago estos iom alia ol la unuaj du. La ĉefa diferenco estas, ke multaj organizaj paŝoj estas solvendaj interrete. En kelkaj lokoj, kie troviĝas kaj la modernaj teknikaĵoj kaj kompetentuloj, eblos denove okazigi ankaŭ la parolan parton uzante Skajpon aŭ la servojn de Google+.

Jam registritaj estas ekzamensesioj en Ĉeboksaro, Hago, La Chau x-de-Fonds, Limoĝo, Managvo, Moskvo, Parizo, Seulo, Tokio kaj Tuluzo. Por ricevi rajton aranĝi lokajn sesiojn sufiĉas, ke en la sama loko kolektiĝos minimume 5 personoj, kiuj rajtos ekzameniĝi pri malsamaj niveloj. Do, ne necesas, ke por unusola nivelo estu 10 kandidatoj.

La rajton organizi sesion oni devas peti plenigante la aliĝformularon, post kies aprobo fare de la komisiono, la loko ricevos sian kodon. La reta KER-AGENDO gvidos la organizantojn en la preparlaboro.

Pli da informoj pri la organizaj kondiĉoj kaj aliaj detaloj troviĝas ĉi tie: http://edukado.net/novajhoj?id=421

### Plibonigu la vian scion de Esperanto per parolado.

Jen aktualigata listo de Skype-nomoj de esperantistoj: http://eltwish.com/skypelisto/index.php

### Venontaj renkontiĝoj

Kantado de korusaro Interkant', Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 8a ĝis 11a de majo, http://gresillon.org
Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Greziljono., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 11a ĝis 17a de majo, http://gresillon.org/s1
Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 17a de majo 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/
Staĝo por lernado de la lingvo, pluraj niveloj kun kuba esperantisto Miguel Angel Gonzales, 20a-24a de majo, KVINPETALO Esperanto-Centro, informoj @ kvinpetalo.org (forigu la spacojn) aŭ http://kvinpetalo.org/
Kongreso de France Espéranto, Chambéry, Francio, 29-a de majo ĝis la 1-a de junio 2014
64a Studsesio (ĉeftemo Esperanto-muzikkulturo), Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 29a de majo ĝis 1a de junio, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de
MARO, Mara Renkontiĝo, apud St. Tropez , Mediteraneo, Francio, ĉ. 31-a de majo ĝis 14-a de junio 2014, http://www.esperantoland.org/eo/kontakto.html
91a Germana Esperanto-Kongreso (GEK), Erfurt ; Germanio, 6a ĝis 9a de junio 2013,
Amika Tago, Mulhuzo, Francio, 14a de Junio 2014, Por pliaj informoj kontaktu Manfred (manfred ĉe westermayer.de)
Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 21a de junio 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/
Roskilde Festivalo 2014, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 6a de julio 2014, http://roskilde.festoklubo.dk/rf14 aŭ https://www.facebook.com/events/204648439659455/
Semajnoj de Esperanto-Perfektigo (SEP) - intensaj lingvokursoj kaj instrukapabliga, metodika trejnado, klerigado. 65a Studsesio, klerigado en formo de blokseminario. STIPENDIOJ peteblaj!!, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 19a de julio ĝis 3a de aŭgusto, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de
La 50-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET-50), Jelgava, Latvio, 28-a de junio ĝis la 5-a de julio 2014, http://www.esperanto.lv/index.php/lang-eo/la-50-aj-baltiaj-esperanto-tagoj-bet-50
INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO (IES), Erevan, Armenio, 28a de junio ĝis 4a de julio, http://aresun.weebly.com/
Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj.,

Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 29a de junio ĝis 6a de julio, http://gresillon.org/s2
Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK-2014), Viktorio, Brita Kolumbio, Kanado, 29-an de junio ĝis la 8-an de julio, Ellen M. Eddy (eddyellen ĉe aol.com) aŭ http://nask.esperantic.org
10-a kongreso de Europa E-Unio, Rijeka Kroatio, 6a ĝis 12a julio 2014, Eŭropa Esperanto-Unio LKK, (eeu ĉe europo.eu) kaj http://eeu-kongreso.webnode.com/
Somera Esperanto-Studado 2014, Nitra, Slovakio, 12a ĝis 20a de julio, http://ses.ikso.net
Karioka Renkontiĝo (KoRo), Rio de Ĵanejro, Brazilo, 14a ĝis 18a de julio 2014, http://koro.brazilo.net/ aŭ http://tinyurl.com/koro-rio
70a IJK 2014, Fortalezo, Brazilo, 18-a ĝis la 25-a de julio 2014, https://www.facebook.com/ijk2014 aŭ http://ijk.brazilo.net/ aŭ http://www.tejo/ijk
12-a SOMERE, Dahlem-Baasem, Germanio, 23-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 2014, http://www.esperantoland.org/somere
25-a Internacia Junulara Semajno, Horány, Szigetmonostor, Hungario (nur 10 kilometrojn for de Budapeŝto), 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, https://www.facebook.com/events/264440613710468
99a Universala Kongreso, Bonaero, Argentino, 26a de julio ĝis 2a de aŭgusto 2013, http://uea.org/kongresoj
Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 1a ĝis 9a de aŭgusto, http://gresillon.org/s3
87-a SAT-Kongreso 2014, Dinano (Francio), 9a ĝis 16a de aŭgusto 2014, http://www.satesperanto.org/
Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 9a ĝis 17a de aŭgusto, http://gresillon.org/s4
24-a KISO (Kafoklaĉa Internacia Somera renkontiĝO) por „ludi, krei, sperti vin mem”, Marburg, Germanio, 10-a ĝis 17-a de aŭgusto 2014, http://www.esperanto.de/kiso
Somera Esperanto-Studado 2014, Mendeleyevo, Rusio, 17a ĝis 25a de aŭgusto, http://ses.ikso.net
SUNO KAJ MONTOJ - 81-a Itala Kongreso de Esperanto, Fai della Paganella, Trento, 23a ĝis 30a de aŭgusto 2014, http://kongreso.esperanto.it
25-a MontKabana Renkontiĝo (MKR), Sillian, Aŭstrio, 18-a ĝis 21-a de septembro 2014, http://keja.hr/mkr/aliĝu-al-mkr/
30-aj ARtaj KONfrontoj en Esperanto (ARKONES), Poznan, Polando, 26a ĝis 28a de septembro, http://arkones.org
TORPEDO-9, 66a Studsesio (semajnfino pri Esperanto-instruado) + Esperanto-Filmfestivalo, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 2a ĝis 5a de oktobro, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de
2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), Germanio, 19a ĝis 24a de oktobro 2014 sur la migrovojo "Moselhöhenweg". http://www.esperanto.de
AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 24a de oktobro ĝis 1a de novembro, http://gresillon.org/
Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu